

# BULGARA ESPERANTISTO

MONATA ORGANO DE LA BULGARA ESPERANTISTA ASOCIACIO KAJ DE LA BULGARA ESPERANTO-INSTITUTO

Препоржчано отъ Министерството на Народната Просвѣта за училищнитѣ библиотеки съ окружно № 1870 отъ 27 януарий, 1922

Jarabono: 20 bulgara levoj | Anoncoj: 2 levoj je kvadrata  
1 sv. fr. aŭ egalvalora cm. Anoncetoj: 1 levo je vorto  
Adreso: Sofio. Poŝkesto 233 | Redaktoro Sim. St. Hesapčiev

Al ĉiuj geabonantoj kaj al ĉiuj verdstelanoj la redakcio de „Bulgara Esperantisto“ gratulas la novan 1933-an jaron kun siaj sinceraj bondeziroj pri feliĉo, prospero kaj disvastiĝo de la fratiganta verda stelo. Pri potence ol ĉiam ĝis nun brilu ĝi super la nuntempa malserena horizonto!



## INFANOJ LERNAS ESPERANTON

La fotografaĵo montras infanojn, kiuj studis kaj finis specialan porinfanan kurson de s-ano Bogomil Radoslavov en Zlatarica dum la somero 1932.

## Две редици прилагателни

Знаемъ, че прилагателнитѣ въ Есперанто свѣршватъ на *a*. Обаче, не всѣкога е лесно съ тази крайка да образуваме желаното прилагателно.

На въпроса: „Кое е прилагателното отъ вкусъ?“ — всѣки ще отговори: — вкусенъ. А отъ *gusto* — *gusta*. Обаче вкусенъ и *gusta* не се покриватъ по значения, макаръ, че сж прилагателни отъ корени съ еднакво значение: тукъ имаме работа съ прилагателни отъ два различни разреда. На *вкусенъ* отговаря *bongusta*, а на еспер. *gusta* отговаря бѣлг. *вкусовъ*.

Разликата се вижда отъ долнитѣ примѣри:

Вкусенъ плодъ — *bongusta frukto*.

Вкусенъ — *bongusta* означава нѣщо съ *добъръ* вкусъ, а *вусовъ* — *gusta*, което се отнася до вкуса: *вусовитѣ тѣлца* на езика; *gusta sento* — *вусово чувство*, чувство за вкусъ.

Сжщо така:

сѣнка — *ombro*, но

сѣнчестъ — *ombroĉa*, а не *ombra*;

сокъ — *suko*,

соченъ — *sukoza*, а не *suka*;

прашенъ — *polvoza*, а не *polva*;

трѣва — *herbo*,

трѣвистъ — *herboriĉa*,

*kalkeca* (*kalkoza akvo*),

*kalka ŝtono*,

*osteca mano*,

*osta sistemo*.

Отъ тѣзи две редици прилагателни се вижда тѣхното съдържание и значение. Първитѣ иматъ въ Есперанто само окончание на прилагателното и означаватъ, *отношение или принадлежностъ*. Вторитѣ означаватъ *положително качество*: *bon'*, *ĝiĉ'*, *oz'*. Разликата въ съдържанието е ясна. Затова и формитѣ трѣбва да бждатъ различни. На бѣлгарски имаме много наставки за прилагателни. Тѣ даватъ различни отсѣнки въ значението. На Есперанто нѣмаме толкова много наставки затова употребяваме и корени. На бѣлгарски обаче значенията на наставкитѣ се мѣнятъ и преплитатъ. Винаги трѣбва да правимъ разборъ на съдържанието, за да употребимъ правилната форма.

Сим. Ст. Хесапчиевъ

## Нова организация UFE

По решение на Парижката спогодба, възприета отъ националитѣ дружества въ Парижкия конгресъ на 4. августъ 1932 год. решава се да се основе *Universala Federacio Esperantista*. (Читателитѣ сигурно знаятъ, че досега много пжти се е повдигалъ въпроса за преустройството на международната есперантска организация.)

UFE е неутрална по отношение на религия, политика, народностъ,

езикъ, раса и ще се състои отъ национални дружества. Отдѣлни лица могатъ да бждатъ членове на UFE, само ако сж такива на национално дружество, което трѣбва да има най-малко 50 члена. Тамъ, дето нѣма национално дружество, *Internacia Centra Komitato* си, намира секретаръ, докато се създаде нац д-во.

UFE се управлява отъ *Internacia Konsilantaro Reprezenta*, въ

който влиза по единъ представител на всѣко национално дво. Иматъ право по на единъ представител Езиковиятъ комитетъ и Академията. IKR се грижи и за бюджета на UFE и може да възлага изпълнението на свои решения на ISK.

IKR има председателъ, подпредседателъ и секретаръ. Членоветъ на IKR се избиратъ отъ самитъ национални дружества. При заседания и решения на IKR всѣко дружество има гласове пропорционално на броя на членоветъ, за които плаща вноскъ.

Председателтъ свиква I. K. R. най-малко еднажъ въ годината. Предложенията си къмъ нац. д-ва IKR прави най-малко единъ месецъ преди, заседанието (членоветъ могатъ да участватъ и писмено). Съветътъ избира Международенъ Централенъ Комитетъ отъ 7 члена, чийто мандатъ трае 3 години. Двама отъ тѣхъ се преизбиратъ всѣка година, а трима — всѣка трета година.

ISK възлага на LKK уреждането на свѣтовнитъ конгреси. Всѣка година, единъ месецъ преди конгреса, ISK праща на нац. д-ва докладъ за годишната си дейность и програма за дейността си и бюджета презъ идната година. Програмата се обсъжда въ събрание на ISK. презъ време на конгреса.

**Вноски и финанси.** За обикновенъ членъ, който получава членска карта и официалния международенъ бюлетинъ, нац. д-ва плащатъ 0'50 шв. франкъ—15 лв.

**Деенъ членъ** плаща 2'50 шв. фр. и получава членска карта, официалния международенъ бюлетинъ и официалния годишникъ. Членъ поддържникъ плаща 12 шв. фр. и получава освенъ това списанието

на UFE. UFE подържа парично **Езиковия комитетъ** и Академията.

**Езиковия комитетъ** е самостоятеленъ, но нац. д-ва могатъ да представятъ кандидати за него.

**Практически служби и делегати** оставатъ въ общи чърти същитъ, както до сега въ UEA.

Всички останали наредби и положения сж такива, **приблизително както въ UEA.**

Б. Р. Съжаляваме, че по липса на мѣсто не можемъ да препечатаме устава, или поне да дадемъ по обширно извлечение.

## Филмътъ за Кьолнъ

Въ миналия брой дадохме съобщение за него на стр. 3. Отъ второ съобщение на ISK научаваме, че сж изработени нови копия отъ филма за Кьолнъ — градъ на 25. свѣтовенъ есперантски конгресъ презъ 1933. Поради това филмътъ ще бжде въ България **отъ 20 февруарий до 10 априль 1933.** Филмътъ е дълъгъ 439 метра и тежи 3 килограма. Надписитъ сж само на Есперанто. Дружествата и групитъ ще го получатъ **безплатно**, като гарантиратъ, че ще го запазятъ и препратятъ по-нататкъ. Филмътъ може да се проектира и чрезъ малкъ апаратъ който се движи съ ржка.

Дружествата и групитъ незабавно да се обърнатъ до ЦК, за да може да се изработи програма за проектирането на филма.

**Не забравяйте, че отъ изправността ви зависи редовното излизане на BE!**

Elin-Pelin

**En la transa mondo**

Kiam disportiĝis tra la vilaĝo la novaĵo, ke avo Matejko mortis, neniu ekkredis, ke tio-ĉi estas vero, ĉar li emis ŝerci, kaj ankaŭ, ĉar antaŭe neniam okazis al li tiaĵo. Sed kiam avino Jova rakontis pri lia lasta horo, ĉiuj certiĝis, ke tiun ĉi fojon li ne ŝercas. Li revenis de la arbaro, kien li iris por ligno, malŝarĝis sian azenon, alligis ĝin, antaŭmetis al ĝi iom da fojno kaj tuj, kiam li eniris hejmen kaj ekŝidis apud la fajrujo por fumigisian pipon, kvazaŭ li eksentis piikdoloron ĉe la lumbo; kuŝiĝis, ekĝemis kaj...

Kolektiĝis najbaroj, iris ankaŭ avino Jova. Ja, sola estis la mizerulo! Li kaj lia kvieta azenino, griza kiel kolombeto kaj obeema kiel monaihno. Avino Jova iris, sed ĉu oni povas haltigi animon? Nur, ŝi rakontas, mi diras al li kruccigni, kaj li kvazaŭ penas, sed ne povas ekmoviĝi. Oni alportis ankaŭ boteleton da brando. Li prenis ĝin, ekridis kaj eĉ liaj okuloj ekbrilis kaj... lia animo eliris.

Li mortis ridetante. Ĉu ĉar tiam lia animo eniris en la paradizon, aŭ ĉar li vidis la brandon, tion neniu povas diri.

Kiam la mizerulo avo Matejko ekvojaĝis al la postmorta mondo, unue li haltis ĉe unu vojkruco, kie estis multaj vojaĝantoj kiel li.

— Bonan atingon! — li salutis ilin kaj sen milte da pripensoj, demandis:

— Nu, gesinjoroj, laŭ kiu vojo oni iras al la infero?

Ĉiuj ekrigardis lin mirigite.

— Al la infero, al la infero, kiu vojo kondukas? — klarigis

laŭte avo Matejko.

Oni montris ĝin al li kaj li ekiris ĝuste laŭ ĝi.

— Certe oni min metos tien, li pensis, nu, almenaŭ ĝustatempe mi atingu... Mi ne estas destinita por la paradizo, tia malriĉulo... la paradizo estas por la granduloj. Kiu enlasos min tien kun tiuj ĉi ĉifonoj kaj kun tiuj ĉi krevsulkiĝintaj manoj! Okdek jarojn mi vivis en mizerro, kiel hundo, kaj ĉu nun mi ĝuos komforton? Vere, mi penis vivi laŭ dia justeco, sed kiu min demandas. Ja, ĉu Dio tenus librojn pri tiuloj kiel mi? Nin oni enskribis en la diabla librego tuj, kiam ni naskiĝis... Eĉ se ĉiam mi estis pia, mi almenaŭ unu fojon pekis dum drinkado! Kaj mi drinkis! Vere, pro suferrado kaj afliktiĝo mi drinkis, sed, ja, mi drinkis. Ĉar ankaŭ alie mi ne ekfartus bone, mi pensis, — drinku!... Drinku, kie ajn vi finos!... Mi bonege pretiĝis por la infero! Ja, nun mi tien iras. Se oni volas dronigi sin, oni iru al profundaĵo.

Longan vojon marŝis avo Matejko, forgesiĝinte pro pensado. Sed unu anĝelo el nevideblo lin ektiris malantaŭe je la pelto\*).

— Haltu, hej, avo, kien vi iras?...

— Nu, en la inferon, — respondis la maljunulo.

— En la inferon? Vi eraris la vojon, avo!

— He, amiko, mi ne eraris

\*) La ŝopoj (bulgaraj vilaĝanoj loĝantaj en Sofia kaj apudaj distriktoj) ĉiam portas pelton — eĉ dum varmegaj someraj tagoj.

ĝin, — mi bone ĝin trafis... Mi scias kien kondukas ĉiu vojo, ne atentu, ke mi estas simpla.

— Sed vi estas enskribita por esti en la paradizo...

— Nu, knabo, iru vian vojon, ne moku la maljunulojn, ĉar estas hontinde!

Kompreninte, ke per bono li ne povus, la anĝelo ĉirkaŭprenis la maljunulon kaj ekflugis kun li al la hela ĉielspaco, kie odoris mirinda Izmira\*) incenso kaj kie traflugadis aretoj da lumaj anĝeloj kun ocimbranĉetoj en la manoj kaj kantis ĝis forgesiĝo: „Sankta, sankta, sankta estas Dio Cebaot!“

Ili atingis la pordegon de la paradizo. Ĝi estis farita el oro kaj el multekostaj ŝtonoj kaj brilis kiel la suno. Antaŭ ĝi la sanktulo Petro atendis kun arĝenta ŝlosilego en la mano kaj kun librego sub la brako.

— El kiu vilaĝo ci estas? — li turnis sin al avo Matejko kaj komencis foliumi la libregon. Avo Matejko vidas sin senpova. Singultante, li apenaŭ elbuŝigis:

— El Poduene\*) mi estas.

— El Po...

— El Poduene! — laŭte krias avo Matejko, pensante, ke la sanktulo ne aŭdas.

— Po... Po... Po... ekfoliumis la libregon la sanktulo.

— Poduene... bone — senpekulo.

— Ne povas esti! Vi eraras, sanktulo Petro!

— En kio mi eraras?... Tio ĉi ne estas kukosimila libraĉo, sed librego numerita, ŝnurligita kaj stampita per Dia mano, — severe rediris la sanktulo...

\*) De urbo Izmir (Smirna).

\*) Antaŭurbo de Sofio.

— Bone, sed poste ne pent — respondis avo Matejko.

— Kial?!

— He, mi multe drinkis kaj mi ne kredas esti senpekulo.

— Ci multe drinkis, sed ankaŭ multe suferis, kaj tial ci estas absolvita — respondis la sanktulo Petro kaj malfermis al li la pordegon.

— He, sanktulo Petro, se mi estus alkondukinta ankaŭ mian azenineton, — petis avo Matejko, sed la anĝelo puŝis lin en la paradizon, kaj li ĉarmita, ne povis findiri sian parolon.

— Tuj, post kiam avo Matejko eniris la paradizon, li konjektis pri sia maljuna edzino, kiu forlasis la pekoplenan teron multajn jarojn antaŭ li.

— Ĉar oni enlasis min tien ĉi, kvankam mi drinkis kaj de tempo al tempo ŝin batis, nepre oni ŝin metis en la mezo. Ŝi estis treege kvieta kaj ĉion pardonis... Eh, kio estus okazonta al mi, se ŝi ne estus?

Kaj li turnis sin al unu anĝelo:

— He, flugilhavulo, ĉu tie ĉi estas iu avino, la edzino de avo Matejko, nomata Trena?...

— Ŝi estas tie ĉi, — diris la anĝelo kaj ekkondukis la maljunulon tra la paradizo.

He, kiaj belegajoj, kiaj mirindaĵoj! — miris avo Matejko, rigardante tiujn ĉi glorajn paradizajn belaĵojn, kiujn nur la senpekuloj vidos.

Dum ili marŝadis, avo Matejko turnis sin al la anĝelo kaj diris:

— He, flugilhavulo, konduku min al la drinkejo por trinki glaseton da brando, ĉar mia gorĝo ardas.

— Nu, avo, tie ĉi drinkejoj ne estas! — diris la anĝelo.

— Hal ne estas?

— Sincere mi diras, ne estas!

— Ha, kiom stultaj vi estas!

Ĉu tiuj ĉi belegaĵoj estas eblaj sen drinkejo? Kaj kie oni haltos por ripozi, por trinki glaseton da brando, por ricevi forton? Jen, de la tero mi venas, de la malproksima tero, mi estas laca... Tie la pastro diradis al ni, ke en la paradizo estas ĉio, kion la animo volas, kaj efektive... Pli bone estus, se mi estus irinta en la inferon. Ĉu tie estas drinkejoj?

— Tie drinkejoj estas.

— Nu forkonduku min tien, mi petas vin. Kial mi bezonas tiun ĉi komforton, se eĉ guto da brando ne estas! En la infero, efektive, estas malbone, sed mi kutimiĝis: mi suferos kaj en bona horo mi drinketos kaj estiĝos kontenta.

— Neeble, avo!

— Ah! — eksopiris la maljunulo, tio ja similas malliberejon. Oni ne povas iri tien, kien oni volas!

— Vi kutimiĝos, avo! — provis konsoli lin la anĝelo.

— Ah, ĉu ankoraŭ ion mi lernos! — eksopiris avo Matejko kaj komencis paroli ruze:

— He, knabo — diris li al la anĝelo, — bone estus, se vi malfermus ankaŭ drinkejon tie ĉi. Kaj eĉ se mi renkontus la Sinjoron, senŝanceliĝe mi dirus al Li, ke estus bone... Unue ne estas loko, kie derajdus la impostisto, kaj la ceteron lasu!

— Tie ŝi impostistoj ne estas, avo!



Mi vidis vin en iu hela tag'

— la suno fajre brilis tiam —  
vi trotis tra l' amaso de la strat'  
kun kor' bolanta kaj pasia.

Facile spiris via pompa Brust' —  
dum ĝoje kantis verdaj tramoj.  
Mi estas id' de la centmila urb'  
kaj mia sin' sopiras amon.

Mi estas pala kaj petola knab'  
kun miaj dudekunu jaroj  
revanta vage, ĝoje en la tag'  
de viaj bukraj brilaj haroj.

Sed vi perdiĝis en la strata or'  
kun viaj brilo, gajo kaj veluro  
restante por mi nura rememor'  
el la centmila ama urbo.

Mi vidis vin en iu hela tag'

— la suno fajre brilis tiam —  
vi trotis tra l' amaso de la strat'  
kun kor' bolanta kaj pasia.

*Parsifal*

— Ah, ne estas!

— Jes, ne estas.

— Ho, sankta Dipatrino, efektive tie ĉi mi vivos oportune! — ekkriis de ĝojo avo Matejko kaj krucsigninte, aldonis:

— He, tio ĉi pleje plaĉas al mi. Kaj li ekmarŝis pli rapide por serĉi sian maljunulinon.

El bulgara  
Simeon St. Hesapĉiev

Georgi Rajčev

## Unua neĝo

Unua neĝo...

Mi staras apogite ĉe la fenestro kaj rigardas eksteren, — kiel gaje la malgrandaj neĝeroj karaj falas el la senfina vasto ĉiela. Verŝajne la enamiĝinta Marso, kaŝita post la ŝultroj de Jupitero, ŝuperŝutas per ili la harojn de l' endormiĝinta tero ĉasta.

Kiom bela estas la blanka nokto — luma kaj frankvila!

Ĉiujare en tiu nokto antaŭ mi reviviĝas la horo, en kiu, sub mia gepatra tegmento, la unuan fojon mi vidis neĝon. Kaj ĉiujfoje mi travivas tiun nokton per la forto de mia unua ĝojo infana. Tiam ni estis ankoraŭ tiel malgrandaj. Dum la tago blovis malvarma vento kaj ĝi alportis el ie grizajn nubojn, kaj kiam vesperiĝis, la frosta vento ĉesis bati la senfoliajn branĉojn de l' fruktarboj kaj el la ĉielo ekflugis malgrandaj papilioj blankaj. Komence ili falis malofte, tamen poste ili fariĝis tiom multe, ke ili kovris la tutan ĉielon.

La plenaĝuloj parolis, ke neĝas, kaj ni kuris sur la korto, ludis kaj ĝoje kriis — neĝo! Neĝo! La malgrandaj kaj malaltaj tegmentoj pajlaj de nia vilaĝo rapide blankiĝis, la branĉoj de l' fruktarboj pendiĝis, kvazaŭ pro floroj kaj ĉio aspektis tiel specife brila kaj ĝoja, kiel neniam ĝis tiam. Brutoj kuris kaj muĝis, hundoj ĝoje petolis en la neĝo kaj super la kamentuboj de ĉiuj najbaraj domoj, rekte al la ĉielo altiĝis altaj, bluaj fostoj da fumo. Kiam la viroj eniris en

la hejmojn, ili longtempte klakis per kruroj en la verando kaj sur iliaj peltaj ĉapoj estis neĝo, kiu rapide fluidiĝis.

Mia onklino alportis el la korto multon da ligno foliriĉa kaj ĝin ĵetis en la fajrujon. Ni sidis apud la granda fajro, varmigante nin, ruĝaj pro la flamo kaj brue parolis.

Jen: la servisto venis kun malbona sciigo — sur nia stalo staras strigo. — Strigo!... kia mirinda okazaĵo — strigo sur nia garbejo! Ĉiuj eliris por ĝin vidi. Ni ankaŭ eliris. Mi ŝtelkuris sub la mano de mia patrino kaj ekrigardis: — vere sur la angulo de l' garbejo io nigris... Tio ĉi estas timiga kaj kornohava birdo, kiu vidas en la mallumo kaj per kiu multfoje oni timiĝis nin, ke ĝi rabas infanojn. Ĉu eble por iu el ni ĝi alflugis?

Mia onklo eliris kun pafilo en la mano, pasis preter ni, petis nin silenti, kaj poste inside iris al la stalo, genufleksis sur unu genuo kaj alcelis. Ĉiu, ne spirante, atendis momenton, du kaj jen lumiĝis la tubo de l' pafilo, pafo fendis la nokton, timigitaj hundoj ekhurlis, tamen la birdo ne falis. Ĝi movis siajn larĝajn flugilojn kaj svinginte ilin, ĝi dronis en la brila nokto.

Kaj el la ĉielo ĉiam tiel faladis la malgrandaj blankaj papilioj kaj ili kovris la teron...

Ho, unua neĝo!

El la bulgara tradukis  
St. Masárov

n. St. Hesapçiev

## Mia 24-taga propaganda vojaĝo tra Bulgarujo

(Daŭrigo)

Malfermante mian paroladon por la gimnazioj posttagmeze, li varme alvokas al ili kaj rekomendas la ellernadon de Esperanto. Vigla intereso. Tre surpriza estas por la gelernantoj la granda simileco inter frato, frater, Bruder, brother, frère, братъ (brat) k.a., per kiaj ekzemploj oni komprenas la parencecon de la lingvoj kaj la internaciecon de Esperanto. Vespere okazas la dua (publika) parolado en la granda salono de la urba teatro. Rapide forpasas la tago kaj la vespero.

Matene, mi vojaĝas al Stara-Zagora. En Nova-Zagora denove mi vidas gesamideanojn ĉe la stacidomo. Videbla estas jam „la urbo de poetoj, tilioj kaj cipresoj“. La tuta urbo dronas en verdaĵo. La stratoj estas belaj aleoj kaj bulvaroj. Sed bela, estas Stara-Zagora printempe, kiam floras la tilioj kaj ilia aromo tiklas la flaron. Akceptas min s-ano Dimo Manĉev. Vespere okazas parolado pri „La homa lingvo“ ĉe la knaba gimnazio. Sekvantan tagon okazis du paroladoj pri Esperanto—ĉe la knabina kaj ĉe la knaba gimnazioj. Iuj el la instruistoj ankaŭ montras intereson kaj ĉeestas.

La lastan tagon de septembro mi pasigas en Ĉirpan, gastante ĉe fervojista familio. Posttagmeze ni vizitas vinbergardenon — Ĉirpan estas vinberkultura centro.

De tie ĉi oni eksportas vinberojn al Sofio, al aliaj urboj kaj eksterlanden: en Germanujon, en

Aŭstrion k. a. Ĉi jare estas abundegaj vinberoj. Diversaj specoj, sukerozaj kaj tute maturaj pro la longa sekeco. Revenante, ni portas plenan je dolĉaj vinberoj korbon. Nun en la tuta lando oni festas semajnon de la vinberoj Bonega iniciato de la abstinuloj, kiun subtenas kaj propagandas ankaŭ la registaro. Spite al tio, kion mi aŭdis, mi ne vidis infanojn portantaj ponardojn — tute pacamaj estas la loĝantoj de Ĉirpan. Oni ofte vidas en tiuj ĉi sudaj regionoj de la lando vilaĝanojn en siaj specifaj facilaj veturiloj—ĉaroj, facile kurantaj tra la ebenaĵoj, same kiel en Varna impresas la malgrandaj veturiloj tirataj de azenoj. La terura tertremo en 1928-a jaro detruis multajn domojn en la urbo, sed nun la postsignoj estas malmultaj.

Posttagmeze okazas mia parolado ĉe la gimnazio. La direktoro ĉeestas kaj post la provleciono esprimas la deziron, ke aperu iu persono, kiu daŭrigos. La instruistino pri kemio venas dum la provleciono kaj miras, vidantse ke la gelernantoj parolas en Esperanto.

La unuan tagon de oktobro mi pasigas en Plovdiv. Mi alvenas antaŭtagmeze. Post malgranda ripozo kaj intervidiĝo kun gesamideanoj forpasas la bela aŭtuna tago. Tie ĉi mi ne faras paroladon, ĉar oni ne aranĝis tion jam antaŭe. Vespere mi supreniras unu el la kvin montetoj en Plovdiv por ĝui ĝian noktan vidaĵon. Nokto vualas la vastegan kamparon kaj la



montaron Rodopa sude. Ĉirkaŭ mi etendiĝas la urbego (urbego — laŭ bulgara mezuro) kaj mik-sita obtuza bruo ŝvebas en la aero. Longaj vicoj da lumajoj sude, norde, oriente, okcidente. La elektra reto donas feerian ĉarmon al Plovdiv. La okulo absorbas la mallumegan malproksimon, de kie alvenas karesanta bloveto de la zefiro... Post unu horo mi jam ripozas meze de la bruanta urbo.

Matene granda amaso sin puŝas ĉe la stacidomo. Oni vizitos la proksimajn pitoreskajn lokojn en kaj apud la montaro, celante utiligi la ankoraŭ belajn aŭtunajn suntagojn. Ĉe stacio T.-Pazarĝik mi devas sufiĉe longe tendi kaj interparolas kun s-ano av. Konstantinov intertempe.

La malgrandaj vagonoj celas al sudokcidento. Ĉe stacio Varvara kuniĝas ambaŭ vagonaroj (de Pazarĝik kaj de Sarambej) kaj nun ŝovas sin inter la altaj rokoj ambaŭflanke de la rivereto Elli dere (Venta valo). Foje la vagonaro pasas unu post alia tra tri tuneloj, kiuj estas tiel vicigitaj, ke oni povas vidi samtempe ĉiujn tri. Tuj post tio venas ankoraŭ tri tuneloj kaj entute ili estas dek. Iom post iom la vagonaro supreniras sur ĉiam pli kaj pli krutaj montoj kaj ne malrapide. Ĉe stacio Kostandovo la fervojo jam komencas malsupreniri. Ni ekvidas Ĉepinon, kie ankoraŭ verdas la kamparo. La vilaĝoj situantaj en tiu ĉi intermonta ebenaĵo estas la plej riĉaj en la tuta lando, ĉar la arbaroj liveras abunde pinan kaj abian lignon. En Lâgene min akceptas s-ano d-ro M. Aĝarov. Lâgene estas vera urbo, kiu po-

sedas ankaŭ belegan naturon. Tiun ĉi faman kuraclokon vizitas multaj somerumantoj kaj tiam ĝi estas brua urbo. Sur multaj lokoj mi vidas mane skribitajn afiŝojn pri mia parolado kun verda, sed... sespinta stelo: la skribinto ŝajne ne estis dediĉita pri la nombro de la pintoj de nia stelo. Lâgene havas belan teatron, sed ĝi ankoraŭ ne estas tute preta. El ĉiuj vilaĝoj en Ĉepino nur Rakitovo ne havas varmajn fontojn. La naturo malavare dotis Ĉepinon. Matene je la 3-a de Oktobro mi vizitis la faman „Veljova banja“ kaj vespere Banja Ĉepino. Dum la ceteraj regionoj de la lando suferas pro la senkompataj sunradioj kaj soifegas, tie ĉi la fontoj tuttage eligas akvon plenkvante. Mi vizitas la fonton „Kleptuza“ — granda kvanto da akvo elfluas el la roko kaj oni ne utiligas la tutan: Parto de ĝi fluas en la riveron, sed antaŭ tio oni utiligas ĝin jene: ĝi fluas tra lignaj tuboj en konusforman kavon, ĉirkaŭitan per tabuloj kaj la akvo mem lavas tapiŝojn. En ĉiuj ĉi vilaĝoj estas multaj lignaĵfabrikejoj kaj distilejoj de gudro kaj terpentino. Tian mi vidis en Rakitovo. Oni plenigas la kaldronojn per pinpecoj riĉaj je rezino kaj submetas al seka distilado dum 18 horoj. 15—20% de la tuto estas gudro kaj 5—6% — terpentino. La lastan oni distilas ankoraŭ du fojojn kaj ĝi malpliĝas je 25—30%. Restas ankaŭ bonkvalita pinkarbo, kiun uzas la forĝistoj. Rakitovo dum la lastaj jaroj multe plibeliĝis. Specialan atenton meritas ĝia teatro, belega interne kaj ekstere. Pri ĝi multaj urboj povas envii al Rakitovo. Tie ĉi

mi pasigis du tagojn ĉiam inter la geinstruistoj. Ili ne forgesos nian memorindan samideaninon Dafinka Spasova, kiun la kruela morto forrabis el inter ni antaŭ unu jaro. La belaj vilaĝoj de Ĉepino ĉiam restos karaj en mia memoro, sed nun la mallonga tempo kaj severe ellaborita programo ne permesas al mi ĝui la belegan naturon en ĝi mem... Denove al nordo! En vilaĝo Varvara mi restas mallonge, ĉe samideano Elefterov — instruisto. La popolaj instruistoj por trovi oficon traveturas la tutan landon. Li estas de Norda Bulgarujo kaj oficas ĉi tie, dum hodiaŭ instruistino el Lâgene veturis al Norda Bulgarujo..

Pazarĝik!... Lasta punkto de mia vojaĝo. Ĝi estas vinberkultura urbo kaj nun la komerco de vinberoj estas vigla — tiom vigla kiom estas eble en la nuna krizo. Kaj tiom malkaraj estas la vinberoj, ke kontraŭ unu dolaro oni povas ricevi 100 kilogramojn de ili. Pazarĝik havas neniun rimarkindaĵon preskaŭ — nur la insulo en Marica beligas ĝin kun siaj altaj maljunaj arboj kaj ombroriĉaj aleoj. Tie ĉi okazis du paroladoj. Ankoraŭ unu estas necesa por havi entute 20.

Dimanĉe okazis la lasta (19-a) parolado en la salono de legejo „Zora“. Ĉeestis 400... ne miru!.. kvarcent seĝoj kaj kvardek homoj. Sufiĉe...

Tagmeze ni promenas en la insulo kaj faras komunan foton. Mi devas rapidi. Finiĝas mia vojaĝo. Kaj jen la rezulto: 19 paroladoj, el kiuj:

Pri „Esperanto kiel internacia lingvo“ 16.

Pri „La homa lingvo“ 2

Pri „Esperanto kiel helpanto

en lingvostudado“ 1.

Por ĝelernantoj 11.

Por ĝenerala publiko 8.

Ĉe la stacidomo mi kaj s-ano Iv. Konstantinov denove interparolas, atendante la lastan en mia vojaĝo vagonaron.

— Ĝis revido!

— Ĝis revido! Agrablan vojaĝon!

La vagonaro avida manĝegas kilometrojn. En mia konscio tumultas impresoj, kolektitaj dum 24 tagoj el diversaj lokoj de la lando.

— Ĝis revido, gesamideanoj el tuta Bulgarujo.

---

Rabeno d-ro Hananel

## Eva

„Tiam Dio dormigis profunde la homon, eltiris ripojn kaj faris el la ripo virinon kaj forkondukis la virinon al li..“

Kial nome el la ripo estas farita la virino, el parto de la korpo, kiu ne apartenas al la plej gravaj? — Ĉar, se ŝi estus farita el la kapo, ŝi estus tre saĝa kaj fiera; el la okulo — ema al la ekstera pompo kaj korumpo; el la orelo — tre sciivolema; el la buŝo tre babilema; el la koro — tre sentema; el la manoj — taŭga nur por mana laboro; el la piedoj — adorantino de la dancado.

Tial Dio elektis la ripojn, kiel plej modestan parton de la korpo, por ke la virino ĉiam rememoru sian modestan devenon kaj sian devon — esti modesta.

Tamen, Dio diris: „Vi malakceptis mian planon“ (Sentencoj, ĉapitro 1, 25), ĉar ĉio ĉi ekzistas ĉe la virino.

El la bulgara S. St. H.

## Enlanda kroniko

**Tirnov.** La esper. s-to „Zamenhof“ ĉe la komerca gimnazio malfermis kurson por gimnazianoj.

**v. Varvara** (T. Pazarĝisko). Dum tiu ĉi sezono denove malfermis kurson nia fervora samideano Petr Elefterov — instruisto. Vizitas 20 personoj.

**Varna.** Dum novembro oni malfermis Esperanto-kurson ĉe la komerca akademio. Regule partoprenas 15 personoj — gestudentoj.

**Stara-Zagora.** De la 11. XI. nia samideano P. G. Pamporov malfermis unumonatan kurson laŭ la rekta metodo. Vizitas 28 geurbanoj. Antaŭe li faris paroladon pri Esperanto.

**Propaganda vojaĝo.** Dum la Paska libertempo (en la mezo de Aprilo) nia redaktoro intencas fari propagandan vojaĝon, dum kiu li vizitos kelkajn lokojn. Oni povas aranĝi regionajn konferencojn, kiuj okupos sin pri lingvaj kaj organizaj demandoj. Societoj kaj grupoj, dezirantaj esti vizitotaj, ne prokrastu sciigi tion. Tiamaniere ni povas interkonatiĝi kaj labori pli intense kaj kune.

**Ŝumen.** Je la 12-a de Novembro la s-to aranĝis demonstraĉian lecionon de Esperanto ĉeestis proksimume 300 gelernantoj. Kurson gvidas s-ano Lazarov.

**T. Pazarĝik.** La s-to aranĝis ekspozicion je la 4. XII. kaj 11. XII, bonege vizitita.

Por la verda semajno la societo presigis propagandajn broŝuretojn.

Je la 22 XII ĝi malfermis kurson. Gvidas s-ano Jordan Lupov.

**Jambol.** Okaze de la malfermo de la kurso d-ro St. Kadiev el Sliven

legis interesan paroladon sur la demando: „Esperanto kaj la malgrandaj popoloj“. Ĉu nia popolo povas esperi, ke iam la bulgara lingvo fariĝos la internacia? Eble la grandaj popoloj, kiel la franca, angla aŭ germana povus kaŝi similan esperon kaj kontraŭstari al Esperanto. Sed la bulgara popolo? Ĉu Esperanto ne estas unu el la plej taŭgaj iloj, por ke ni, bulgaroj, povu ekstari sur la sama estimeca nivelo kun la grandaj popoloj, se ni montrus la bonajn ecojn de nia energia popola spirito ĝuste per Esperanto?

Post la parolado la jambola grupo havis sian regulan semajnan kunvenon. Belega kunveno! Ĉarma ĉenero el la granda esperantista ĉeno, celanta ĉirkaŭbraki la tutan terglobon.

Bonege, senlace laboras inĝen-Kurtev kaj d-ro Paskalev!

Примерно сж се отчели за „Bulgara Esperantisto“ отъ:

Гор. Орѣховица и гарата	26	абон.
Пловдивъ	12	„
Разградъ	10	„
Т.-Пазарджикъ	10	„
Ст.-Загора нов. курсисти	7	„
Гара Варвара	5	„
Русе	5	„
Видинъ	5	„
Г. Джумая	5	„
Поповско	5	„
Шуменъ	4	„
Кнежа	4	„
Сливенъ	4	„
Севлиево	4	„
Габрово	4	„
Кюпрю-Къой, Провад.	3	„
Гара Лесичери	2	„
Неврокопъ	2	„
с. Сумерь Фердинандско	2	„

## Движението въ чужбина

**Почина** на 3 октомврий т. г. Пауло Ленгелъ, който много години наредъ работи въ нашето движение. Роденъ е презъ 1868 и останалъ сиракъ на 4 години. Есперантистъ отъ 1896. Въ 1902. прие отъ Паулъ Ниленъ да издава „Lingvo Internacia“. На 1904. основа въ Парижъ „Presa Esperantista Societo“. Съавторъ е на две еспер. граматики. Съредакторъ на „Literatura Mondo“ и „L' Esperantiste“. Редакторъ на „Juna Esperantisto“ (1910—14). Членъ на Есперантската академия и близъкъ приятель на Теофилъ Каръ, когото не се забави да последва, като ни напусна следъ толкова голъма дейность за нашето движение. За смъртта му жалятъ есперантиститъ отъ цѣлия свѣтъ.

Нашитъ съболезнования къмъ опечаленото семейство на този труженикъ.

**Гърция.** Отъ 16—18 юлий т. г. въ Атина станалъ първиятъ конгресъ на гръцкитъ есперантисти. Конгресътъ взелъ р е ш е н и е и о т п р а в я з о в ъ къмъ правителството да въведе Есперанто като задължителенъ предметъ на първо време въ висшитъ учителски институти, въ търговскитъ училища и въ училищата за допълнително образование за държавни учители. Сжщотъ се иска откриването на извънредни катедри по Есперанто при университетитъ въ Атина и Солунъ.

**Въ Атина** се водятъ курсове при Университетския клубъ, учителския институтъ и при втора девическа гимназия.

Основани сж групи въ Солунъ, Кавала, Митилинъ, Йоанина, Демиръ-Хисаръ (Сидирокастронъ) Фа-

магуста (Кипъръ) и др. които развиватъ похвална дейность.

**Англия.** 24 конгресъ на английскитъ есперантисти ще стане отъ 14 до 17 априль 1933 год. Между друго ще се уредятъ и изпити по Есперанто.

**Въ Кьолнъ,** градътъ на 25-ия свѣтовенъ есперантски конгресъ е основана есперантска група отъ 28 трамвайни служащи, които безъ съмнение ще укажатъ ценни услуги на конгресиститъ. Открити сж курсове за трамвайни и пощенски служащи. Посещаватъ се добре. Всѣка седмица мѣстната група устройва събрания съ реферати, сказки и др. номера. На 27 XI Герм. Есп. Институтъ произвелъ изпити по Есперанто. Норддойчеръ Лойдъ е поискалъ 100 афиши за 25. свѣтовенъ конгресъ за разгласа въ Съед. щати. Въ Кьолнъ се урежда 12-ия международенъ конгресъ на слѣпитъ есперантисти.

**Файумъ** (Египетъ). Германскиятъ съидейникъ Едмундъ Шайле направи сказка за пжтуванията си и за ползата отъ Есперанто предъ повече отъ 200 души. Превеждѣ Т. Милали, който устрои еспер. изложба въ Файумъ и близки мѣста.

**Франция.** Главниятъ съветъ на департамента Буше дю Ронъ прие резолюция за преподаване Есперанто въ училищата. Сжщото стори и съвета на Алпъ Маритимъ.

**Унгарскиятъ** скаутски съюзъ издаде речниче за унгарскитъ скаути на петъ езика между които и Есперанто.

**Рига** (Латвия). Презъ време на тазиесенната изложба на национални произведения се устрои и есперантска изложба и се напра-

внха 12 сказки за Есперанто. Водят се нѣколко курса за начеващи и напреднали. Преподава и познатиятъ еспер. поетъ и писателъ Юлио Баги.

**Шиаулиай** (Литва). На 23. X. е изнесена сказка на тема „Международенъ езикъ и животъ“ отъ съидейника Л. Алсейка. На 11. XI. се откри курсъ. Кино „Триумфъ“ прие да дава бесплатно есперантски позиви и обяви.

**Осло** (Норвегия). Водят се курсове за начеващи и напреднали.

**Штавангелъ** (Норвегия). На 25. X. направи сказка за Естония предъ ученици и учители съидейникътъ Сепикъ. Присѣтствуваха повече отъ 600 души.

**Цюрихъ**. На 14. X. младиятъ индийски съидейникъ Мустафа Раденъ говори за пѣтешествието си и за нравитѣ и обичаитѣ на о-въ Ява.

**Буеносъ Айресъ**. Есперантскиятъ курсъ чрезъ кореспонденция показва голѣмъ успѣхъ и напредъкъ. Тази есенъ записанитѣ достигатъ 1,000 души отъ всички части на Аржентина. Печатътъ постоянно дава сведения за успѣхитѣ и постиженията на Есперанто. Пропагандата чрезъ радиото и чрезъ въздухоплаването сѣщо дава своитѣ резултати.

Позивътъ на TAGE (Всемирень Учителски Есперантски Съюзъ) къмъ учителитѣ отъ цѣль свѣтъ е преведенъ на испански и разпратенъ заедно съ окрѣжно до всички учителски организации и дружества, включително и до Националния Съветъ за Народната Просвѣта.

„Aego Club Argentino“ учтиво даде свои аероплани на разположение на АЕА (Аржентински Есп. Съюзъ). Презъ време на три летения се прѣснаха 50,000 хвърчащи

листа надъ Буеносъ Айресъ и околноститѣ.

Д-ръ Карлъ Вослеръ, доцентъ по романски езици и литератури при Мюнхенския университетъ, поема сѣщата длѣжностъ въ Аржентина. Далъ е изявления въ полза на Есперанто предъ голѣмитѣ Аржентински вестници „Critica“ и „La Nación“, отъ които се вижда, че добре познава Есперанто и неговата история и, че е голѣмъ неговъ привърженикъ.

**Тукуманъ** (Арж.) Нѣколко отъ ученицитѣ на кореспондентниятъ курсъ на АЕС основаха група и заработиха дружно за Есперанто.

**Лвовъ** (Полша). Дружеството развива усилена дейность. Водят се курсове по прѣката метода. Урежда се „живо списание“, чрезъ което събранията сѣ приятни и интересни. (Б. Р. „Viva gazeto“ се състои отъ разкази, хуморески, стихотворения, съобщения и др. под. отъ самитѣ присѣтствуващи).

---

50% ОТСТЖПЪ ПОБЪРЗАЙТЕ!

## Пъленъ двоенъ речникъ

на есперанто съ основна граматика,  
III-то издание (320 стр.) и

## Българска антология

китка отъ избрани стихове и разкази отъ 40 български писатели на есперанто, съ портрети (250 стр.) — добъръ подаръкъ и за чуждестраннитѣ ви кореспонденти.

Дветѣ есп. книги заедно **САМО за 105 лв.** предплатени, включително пощ. разноски и препорѣжка.

Адресъ : Ив. X. Кръстановъ  
ул. 6 септемврий, 2, София

## El ĉiuj lokoj kaj epokoj

**La eskimoj** loĝas en Grenlando kaj la regiono inter la golfo de Hudson kaj la markolo de Behring. Iuj opinias, ke ankaŭ la ĉukĉioj en Siberio estas eskimoj. Ili estas malaltaj fortaj kaj apartenas al la mongola raso. Ili havas nek ierarhion, nek regadon. Ĉiu familiestro estas mastro ĉe si. La ĉaso kaj fiŝkaptado liveras ilian ĉiutagan manĝaĵon. Siajn kostumojn ili faras el la feloj de blankaj ursoj, cervoj kaj hundoj, ili loĝas en tendoj, aŭ en dometoj faritaj el glaciaj blokoj. Multaj el la eskimoj vivas ankoraŭ kiel en la ŝtonaĝo—ili uzas ŝtonajn aŭ ostajn instrumentojn kaj armilojn. Ili veturas tra la senfinaj neĝkovritaj ebenaĵoj kaj sur la dikega glacio per glitveturiloj, kiujn trenas hundoj.

**La bananujo** apartenas al la herbacoj kaj kreskas en la tropikaj regionoj—ĝiaj folioj atingas 3 metrojn da longeco. La fruktoj estas longaj kaj kun flava koloro. Ili formas tre grandajn faskojn. La bananujo devenas de Hindujo, sed nun kreskas preskaŭ en ĉiuj varmaj regionoj. Ĝiaj folioj servas por kovri la dometojn, nutri la brutojn—eĉ oni uzas ilin kiel tukojn. El la trunko oni ricevas fibrojn, el kiuj oni fabrikas teksaĵojn kaj produktas ankaŭ paperon. La fruktoj kun mola karno estas dolĉaj kaj tre nutrecaj. Oni manĝas la bananojn krudajn, kuiritajn k. t. p.

**La maorioj** loĝas en Nova Zelando, kiu konsistas el du insuloj kaj situas en la Pacifika oceano. Ili estas tiel kulturaj, kiel la eŭropanoj kaj aliaj nunaj popoloj. Ili praktikas strangan (por ni!) salutmanieron. Kiam du maorioj renkontas sin ili samtempe premas al si la manojn kaj intertuŝas la nazojn.

**Subtera urbo**, la sola sur nia planedo ekzistas en la Libia dezerto, kiu estas nordorienta daŭrigo de Sahara. De multaj jarcentoj la loĝantoj de urbo Garian loĝas sub la tero kaj eliras nur por prizorgi siajn olivĝardenojn aŭ safarojn. Se oni enrigardus tra la faŭkoj, oni vidus kiel marŝas la loĝantoj, kiel en ĉiu strato. La loĝantoj de Garian estas hebreoj. Ili havas ankaŭ sian sinagogon. La urbo datumas de preskaŭ 2,000 jaroj kaj havas 10,000 loĝantojn, kiuj nek plimultiĝas, nek malpliĝas. Vera regado ne ekzistas, ĉar ne ekzistas krimantoj. Ĉiuj loĝas honeste kaj en paco. De la komenco oni manĝas vegetaran manĝaĵon. Ĉe ili ankoraŭ vivas la delonge mortinta antikva hebrea lingvo, kiun ili parolas. Iuj el ili konas ankaŭ araban kaj italan lingvojn. Inter la loĝantoj ne ekzistas riĉuloj kaj malriĉuloj ĉar ĉiu perlaboras nur tiom, kiom bezonas.

---

### Alvoko

Mi serĉas bonstilajn tradukantojn el Esperanto, kiuj havas interrilatojn kun gravaj gazetoj de sia lando por instigi la gazetojn al publikigo de ekonomiaj, industriaj kaj komercaj artikoloj. Turnu vin al: prof. d-ro Dietterle, Beethovenstrasse 19, Leipzig.

---

### DEMANDO KAJ RESPONDO

En la malliberejo renkontis sin du samsortanoj—unu kondamnita, ĉar li ŝtelis bovinon, kaj la cetera—horloĝon. Tiu, kiu ŝtelis bovinon, ekdeziris moki la alian:

— Kioma estas la horo, amiko?

— Jam estas tempo melki la bovinon—respondis tiu.

## Amuzo kaj ŝerco

### PASTRO, SOLDATO KAJ HOMO

Sinjoro demandas knabon sur la strato:

— Ĉu tie ĉi pasis tri homoj?

— Ne sinjoro: antaŭ kelkaj minutoj pasis tie ĉi unu pastro, unu soldato kaj unu homo.

### KIO ESTAS LA VIVO?

La vivo estas vagonaro: la jaroj — stacioj; la morto — stacio de alveno; kuracistoj estas lokomotivoj; apotekistoj — la biletoficistoj.

### ĈU VI KONAS ARITMETIKON?

Marŝante sur strato, knabo trovis 20-frankan bankbileton antaŭ la domo havanta numeron 30. Klom da mono li trovas antaŭ domo № 75?

### LI NE SCIAS LEGI

— S-ino, kial vi ne sendas vian fileton en la lernejon?

— Ha, s-ro, kiel estas eble? Ja, li scias nek legi, nek skribi.

### ESTIMO

— Tiu ĉi s-ro tute ne estas ĝentila: antaŭ neniu li deprenas sian ĉapelon.

— Mi konas personon, antaŭ kiu li ĉiam deprenas la ĉapelon.

— Kiu li estas?

— La razisto.

### MOMENTO KAJ CENTIMO

Hebreo demandas Dion:

— Sinjoro kio estas por vi miliono da jaroj?

— Miliono da jaroj estas por mi momento.

— Kaj kio estas por vi miliono da frankoj?

— Unu centimo.

— Kara Dio, donu al mi unu centimon!

— Atendu momenton!

### TASKO

Formu frazon, kiu devas havi ĉiujn literojn de la esperanta alfabeto. Kiu sendos plej mallongan frazon, ricevos premion.

## NIA REDAKTORO

### deziras korespondi pri lingvoj

folkloro, etnografio k. s. kun gesamideanoj el la tuta mondo.

Interŝanĝas lingvajn materialojn pri ĉiuj fakoj de la lingvoscienco: ĝenerala kaj kompara lingvoscienco, gramatiko, sintakso, dialektologio kaj etimologio.

Interŝanĝas popolajn fabelojn, priskribojn de kutimoj kaj moroj; *vortarojn*, gazetojn, librojn en ĉiuj lingvoj.

Preferas instruistojn, profesorojn, studentojn.

### NEPRE RESPONDAS

Korespondas en: Esperanto, franca, germana, rusa, bulgara.

Adreso:

Simeon St. Hesapĉiev

Poŝtkesto 233 — Sofia — Bulgarujo

# БЪЛГ. ЕСПЕРАНТСКИ СЪЮЗЪ

## ДОСТАВЯ:

1. Курсъ по Есперанто — Ат. Д. Атанасовъ — 7 издание лв. 25
2. Учебникъ по Есперанто — д-ръ Захари Захариевъ 50
3. Есперантски синтаксисъ — д-ръ Захари Захариевъ 22
4. Практична граматика на Есперанто 3
5. Ключъ на Есперанто 4
6. Anekdotaro — Süsseg 10
7. Есперанто ще завладѣе свѣта — д-ръ Д. Гаврийски 12
8. Възможенъ и нуженъ ли е международенъ езикъ — д-ръ  
Ив. Д. Шишмановъ 4
9. Конгресни речи на Заменхофъ 1, 2, 3 и 4/5 по 2
10. Портретъ на Заменхофъ 45×30 см. 10
11. Стенна граматика на Есперанто 1
12. Есперанто — д-ръ Ив. Д. Шишмановъ 2
13. Речникъ на Есперанто (двоенъ) — Ив. Х. Кръстановъ 75
14. Есперанто-български речникъ — Ас. Григоровъ 15
15. Българо-есперантски речникъ — Ас. Григоровъ 25
16. Картички съ лика на Заменхофъ 1
17. Картички „La mistera stelo“ 1
18. La espero (текстъ и ноти) 2
19. Международна конференция за общъ търговски езикъ 5
20. Rememoroj de esperantisto — Ada 22
21. Novaj bulgaraj rakontoj — Vazov 15
22. Versaĵoj de Hr. Botjov — tradukis Iv. Dobrev 20
23. Lernolibro de esperanta stenografio (sist. Duployé—Flageul) 8
24. Esper. stenografia biblioteko unu numero 6
25. Esperanto-bulgara frazaro — G. Gaševski 8

За поръчки до 100 лв. да се прибавятъ 10% за пощенски разноски. При по-голъми поръчки правимъ 20% отстъпъ при наши пощенски разноски. Изпълняватъ се само предплатени поръчки. Суми и писма да се изпращатъ съ пощенски записъ на адресъ:

Български Есперантски Съюзъ  
Пощенска кутия 233 — СОФИЯ

*Мис. Ив. Николов*

*адвокатъ*

*Орбенов*